FN PER ANC 47


# Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL-TRIMONATA BULTENO

N°40 (nova serio) - N°1[illegible]a - JUNIO 1977

REDAKTAS : Sino Pottier 21 allée des Roitelets 76190 YVETOT.

Sendu la manuskriptojn antaŭ la : 10a de februaro - 10a de majo - 10a de aŭgusto - 10a de novembro -

Eldonita de : La ESPERANTO-GRUPOJ de la RUEAN REGIONO -

EKSPEDAS : Maryse + Pierre Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 ROUEN

UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE : ccp : 283.40 H. ROUEN

KOTIZOJ : Minimuma Kotizo : 7,00 Fr. - Subtenkotizo ek de 40,00 Fr.
Nura abono al NORMANDA ESPERANTO BULTENO sen membreco: 7,00 Fr.

"La verkintoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj."


# AGRABLAJN

# SOMER-FERIOJN !

Dum ni presas tiun bultenon, kelkaj el vi jam ferias. Multaj aliaj faros tion tre baldaŭ.

Al ĉiuj ni deziras bonajn kaj agrablajn feriojn, precipe al tiuj kiuj decidis trapasi sian libertempon kun alilandaj Esperantistaj amikoj, aŭ en Internacia Kongreso, aŭ en unu el la famaj Esperanto-somerumejoj: Grésillon, Krommenie, Primôsten aŭ Helsingør. Sed ĉio havas finon. Baldaŭ rekomenciĝos la laboro. Ni ne forgesu tiam ankaŭ uzi niajn fortojn por labori por Esperanto.

Ĉiuj devas kunlabori. Nur tiel ni atingos sukceson.


- Polycopié par le Groupe Espérantiste Rouennais - DÉPOT LÉGAL 2e TRIMESTRE 1977 -
Le Gérant : P. Lemarchand -

Z

ENTUZIASMULO kiu STAMPIS
la NORMANDAN MOVADON :

Sinjoro Marcel BOSC
-:-:-:-:-:-:-:-

Siatempe (Bulteno N° 122a, Sept. 1976a), ni anoncis la subitan malaperon de Marcel BOSC, 71 jara, bone konata inter niaj normandaj samideanoj, kaj ankaŭ en pli vastaj esperantistaj rondoj.

Sro BOSC naskiĝis en la jaro 1905a, en Le HAVRE. Li estis filo de ledkomercisto, 98 rue Casimir Delavigne, ĉirkaŭ 300 metrojn de la stacidomo.

Li daŭrigis la patran komercon en Le HAVRE ĝis kiam, pro la konstanta forlaso de ledo en la moderna vivo, li prenis novan profesion de medicina prezentanto por diversaj medikamentoj.

Proksimume je la dato de tiu ŝanĝo en sia kariero, fine de 1954a jaro, li venis loĝi en la ROUEN'an regionon: 32 rue Joseph COURT, en SOTTEVILLE lès ROUEN.

Tiam, li ankoraŭ pli multe profesie vojaĝis, eĉ eksterlanden, precipe al Germanujo. Dank'al siaj oftaj vojaĝoj tra tuta Normandujo, li povis kontakti la grupojn kaj izolulojn, kaj ilin vigligi.

Post la jaro 1970, li iomete malpliigis sian aktivecon, kaj translokiĝis en modernan Rouen'an apartamenton, sur strato Malatiré. Fine, nur kelkajn monatojn antaŭ sia morto, en apartamenton en BIHOREL lès ROUEN.

La juna Marcel BOSC eklernis Espéranton dum la paskaj ferioj 1926aj, en Le HAVRE. Li tuj montriĝis agema, kaj partoprenis la restarigadon de la Havra grupo. Li estis helpsekretario en 1928; Sekretario en 1930; Vic-prezidanto en 1935 kaj Prezidanto kelkajn jarojn poste.

Li faris kursojn. Kun la helpo de Havraj Samideanoj, li eĉ lanĉis etan periodaĵon : L'Esperanto Ligilo.

En Majo 1931a, dum Normanda Kongreseto, Sro ROBIN, Prezidanto de la SOTTEVILLE -a grupo, oficiale rekreis la "FédérationEspérantiste de Normandie", kiel sekcio de la "Société Française pour la Propagation de l'Espéranto", kiu mem estis la nacia membro de l'Internacia Esperanto Ligo (I.E.L). Sro BOSC fariĝis sekretario de tiu renovigita Normanda Federacio.

Depost tiu momento, en preskaŭ ĉiuj bultenoj de la N.F., aperas signoj de la aktiveco de Marcel BOSC. Necesus multaj paĝoj por nur mencii la ĉefajn agojn de nia fervora propagandisto. Mi ĉi-sube notu nur kelkajn :

Je 1936, li okupiĝas pri la ĈE-Kursoj en Normandio, fare de Fraŭlino Lydia ZAMENHOF, filino de la Majstro.

Li mem, ĉiujare, faras kursojn, kaj ankaŭ prelegas en diversaj urboj : FECAMP , YVETOT , LILLEBONNE , CAEN , ktp , kie li spronas la tieajn grupojn.En 1947, ĉe la Kongreso de la N.F. en EVREUX, la prezidanto laŭdas la fajran gvidadon de la Havra grupo, fare de Sro BOSC.

Estas menciinde ke en tiu kongreso kreiĝis la Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj ( UNE ) kies celo estas akcepti ĉiujn Normandajn Esperantistojn, kiaj ajn estu iliaj apartenoj, ĉar en tiu momento, sufiĉe granda nombro da ili ne volis estanoj de la Nacia Organizaĵo.

Samtempe, la Normanda Federacio, daŭris ekzisti, kaj ankoraŭ daŭras. Cetere, la Normandaj Esperantistoj, en granda plimulto, apartenas al la du asocioj. Sed tio estas alia temo, plurfoje klarigita en la bultenoj de U N E .

Kvankam Sro BOSC ne estis unue favora al la kreado de UNE, li tamen akceptis la vic-prezidantecon. Li estis elektita Prezidanto en 1949. Li tiele deĵoris ĝis la Kongreso en CAEN, en 1957. Tiam, li rifuzis ankoraŭ kandidatiĝi, kaj estis aklame titolita Honorprezidanton.Sro Maurice HUET, el le Havre, fariĝis la nova Prezidanto de UNE .

Dum la prezidanteco de Sro BOSC, la Bulteno riĉiĝis per amuzaj kaj trafaj desegnaĵoj, ŝulditaj al lia lerta krajono. Efektive, Marcel BOSC havis eksterordinaran talenton de karikaturisto. Ne kiel multaj modernaj "artistoj", kies produktaĵojn oni ne scias ĉu ili mem desegnis, aŭ iliaj kvin-jaraj infanoj ! Ne, la bildoj de Sro BOSC, kvankam ege amuzigaj, estis veraj artaĵoj. Mi feliĉe

.../...

fotis dekon da ili, kaj kolkfoje ilin projekcias.

Notinde estas ke la Bulteno de UNE ŝuldas al li, depost 1948, la du leopardojn kiuj plibeligas la frontpaĝon.

Do, depost la 1957a jaro, Sro BOSC ne plu okupis oficialan postenon ĉe UNE . Sed li ĉiam fervore laboris por nia asocio, precipe por iniciati la Normandajn Kongresojn. Li ankaŭ ĉiam faris artikolojn por la Bulteno, kaj eĉ reprenis la redaktecon por la januara 1961a Numero.


Sro BOSC sciis altiri la atenton de la oficialuloj por Esperanto, kaj tiel, havi patronadojn por la kongresoj. En marto 1954a, li estis ordenita : Officier d'Académie per Sro André MARIE, Ministro por Edukado, en la kunesto de pluraj eminentuloj. En aprilo 1956a, oni festis en Le HAVRE, la 30 an jaran jubileon de lia Esperantista aktiveco. En Decembro 1958a, Sro BOSC ricevis novan distingaĵon : la "Mérite Touristique" , pro taŭgaj servoj al la franca turismo, pere de Esperanto.

La lastaj jaroj de nia amiko estis mallumigitaj per kelkaj malsanaj eventoj, sed plena je volo, li ne aperigis ilin eksteren. Lia lasta apero inter ni, estis ĉe la renkontiĝo en VAL de SAANE, la 11a de Majo 1975a , pri kiu li deklaris poste ke ĝi estis tre kontenta.


Lasta esperanta manifesto ŝajnas esti la intervujo kiun li akceptis por la Bulteno, meze de la jaro 1976a .

La fatala sciigo trafis nin nur malrekte, kaj neatendite, ĉe la fino de la somero 1976a . Ni anoncis ĝin lakone en la Bno N° 122a, kun la intenco poste dediĉi plenan omaĝan artikolon al nia eminenta propagandisto kaj amiko.

Verkis : E. JOUIS, Boisguillaume .




DESEGNAĴOJ DE NIA
BEDAŬRATA HONORPREZIDANTO
S-ro Marcel BOSC



# U.N.E. KONGRESO

Kiel anoncite en la antaŭa numero, la U.N.Eanoj kongresis en Ŭuilly Le Vicomte, la 23 an kaj la 24an de Aprilo.

Jam sabate posttagmeze alvenis la unuaj samideanoj, kiuj post libera promenado kaj vespermanĝo ĝuis kune tre agrablan distran vesperon. Sed dimanĉon matene alvenis la plimulto de la kongresanoj por ĉeesti la Generalan Kunvenon de U.N.E.

Post tiu kunveno, pri kiu vi trovos la raporton ĉi-sube ciuj manĝis en gaja etoso, en la agrabla kadro de la kongresejo, kaj poste okazis tre interesa vizito de la regiono, kie la ceestantoj povis vidi belan kaj kuriozan vilaĝan preĝejon, kaj la impresaja ruinaĵojn de mezepoka kastelo. Tiu vizito interese finis tiun tre agrablan kongreson.

## ĜENERALA KUNVENO DE U.N.E.

Malfermo. Je la 1? A horo, S-ro Quilliand malfermis la kunvenon en ĉeesto de 20 personoj, dirante sian ĝojon kongresi en Sud-Normandio kaj dankante S-ron Martin, kiu organizis tiun kongreson.

AGADRAPORTO. ( S-ro POTTIER ) La Komitato kunvenis 4 foje dum la jaro por studi diversajn demandojn rilataj al la disvastigo de Esperanto kaj daŭrigis sian agadon favore al la leĝo projekto pri la instruado de Esperanto en la lernejoj. Ĝi ankaŭ organizis tre kontentigan Zamenhof-tagon en Decembro.
La bulteno regule aperis malgraŭ diversaj malfacilaĵoj kiuj provokis teknikajn malperfektaĵojn. Pli ol 10 anoj ĉeestis kongresojn vojaĝis eksterlanden per Esperanto aŭ akceptis eksterlandanojn. Pluraj grupestroj ricevis viziton de S-ro TEXIER el la Pariza Regiono, kiu serĉas rimedojn por propagandi Esperanton.

FINANCA RAPORTO.( S-ro JOUIS.)
En kaso la 1an de Aprilo 1977: 2.229,20 Frs

AGADRAPORTOJ DE LA GRUPOJ. Le Havre, Grand Quevilly, Rouen? Yvetot, Lisieux, Caen kaj Trouville raportis pri sia agado.

BULTENO. ( S-ro LEMARCHAND.) 4 numeroj aperas ĉiu jare. Bedaŭrinde S-ro LEMARCHAND, kiu ĝis nun zorgis pri redaktado kaj sendado ( dum S-ro Guerre presis, kaj S-ro Gibeaux preparis la banderolojn ) ne plu povos redakti. Ni nun serĉas la solvon de la problemo.

KOTIZOJ. Pro altiĝo de la kosto de la bulteno, ni devas altigi la kotizon. La prezo estos nun 7 FRANKOJ ( Subtenkotizo ek de 10 Frs simpla abono al la bulteno sen aliĝo 7 Frs.)

ELEKTO DE LA ELIRANTA TRIONO DE LA KOMITATO. S-roj JOUIS kaj POTTIER estis unuanime reelektitaj.

ELEKTO DE LA KONTROLREVIZIISTOJ. Estis elektitaj Sroj LETAILLEUX kaj LOISEL .

AGADPLANO : U.N.E. pretas helpi ĉiun organizon laborantan por Esperanto. Ĝi do helpos S-ron TEXIER en liaj klopodoj por plibonigi U.F.E.

LOKO KAJ DATO DE LA VENONTA KONGRESO. La Komitato decidos pri tio.
La kunveno finiĝis je la 12 h 15     La Sekretario P. POTTIER

# KONGRESO DE LA NORMANDA FEDERACIO.

La Kongreso de la Normanda Federacio okazis en la JUNULDOMO de TROUVILLE, la I5an de Majo 1977.

GENERALA KUNVENO. Ĝi malfermiĝis je la 9ah45. Tiam, S-ro TAILPIED bonvenigis la kongresanojn kaj, post danko fare de S-rino VINCENT li legis la financan raporton, kiu montras saldon de 228,67 Frs. Poste, Fraŭlino BONNET legis la agadraporton, rilative esperigan, ĉar oni povas konstati revekiĝon en Sud Normandio, precipe en Caen Post tio la estroj de la diversaj grupoj ( Caen, Grand Quevilly, Lisieux, Trouville, Yvetot, Le Havre kaj Les Andelys) raportis pri sia agado.
Tuj post la raportoj okazis la elektoj al la konsilio de U.F.E., kaj la reelekto de la eliranta triono de la Federacia Konsilio.
S-rino VINCENT, forlasonta la regionon fine de Junio, demisiis.
Estis elektitaj: S-roj JOUVIN, POTTIER kaj LEMARCHAND.
La kunvenantaro fine decidis, ke la Federacio kunlaboros en la projekto de S-ro TEXIER, kaj studis proponon de S-ro TAILLEPIED pri disdonado de propagandaj flugfolioj sur la aŭtomobilojn de la feriantaj eksterlandanoj, kaj post adiaŭo de S-rino VINCENT kaj danko al ŝi pro ŝia longa kaj aktiva laboro, la kunveno finiĝis je la I2h10.

MANĜO KAJ DISTRAĴOJ. Post la Generala Kunveno, Geroj TAILLEPIED regalis la kongresanojn per bonega tagmanĝo en la bele dekoraciita manĝejo de la lernejo de TOUQUES apud Trouville. Poste okazis intesa vizito al Trouville kaj Deauville.

VENONTA KONGRESO. Ĝi okazos en ROUEN ( eble en Halle aux Toiles) aŭ Junulargastejo .

NOVA KONSILIO. PREZIDANTO: S-ro POTTIER
SEKRETARIO F-ino BONNET Sylvie
KASISTO S-ro TAILLEPIED
MEMBROJ S-roj JOUIS, JOUVIN, LEMARCHAND, VERON
ka F-ino BONNET Fabienne.

# MIA VINO EN ...

## YVETOT

La kursoj bone funkciis ĝis la fino. La grupo organizis ekzamensesion la 25 an de Junio en la Junulardomo, 4 kandidatinoj prezentiĝis al la atesto pri Lernado, kaj I al la Atesto pri Praktika Lernado; Ĉiuj sukcesis, kaj 3 el li kun "eita" Sufiĉe Bone" aŭ eĉ " Bone "

La Familio Pottier trapasis semajnon en Nederlando je Pasko ĉe Sro ober en Middelburg kaj ĉe la familio Sipma en Harlem. Poste Gesinjoroj cheup, el Bois Himont, akceptis familion Van Hulst, el Haarlem, kaj sia vice isitis ilin en Haarlem dum Julio. Baldaŭ Gesinjoroj pri rakontos la vojaĝon.
Sinjoro Gilbert Bettencourt ĉeestis la kongreson de T.E.J.O. en POITIERS.

Monataj Kunvenoj :

16.04 = S-ino Peltier kaptis nian atenton per temo ne-atendita : Radiestezo ! ( vidu ekstrakton en alia loko )

19.05 = Raporto kaj konkludoj rilate al la nun pasinta vizito de niaj amikoj de Southampton .

Vojaĝoj :

07.04 = Al la Kongreso de la Freinet-movado kiu okazis en Rouen , partoprenis S-ro P.Mary

23 / 24.05 = Ok membroj de la Grupo ĉe-estis la jaran Ĝeneralan Kunvenon de U.K.E. en Ouilly-le-Vicomte ; sur aliaj paĝoj de ĉi tiu bulteno vi legos kompletajn informojn . Estis tre agrable retrovi Sud-normandajn Samideanojn ! Ni notu ke la Leksovianoj ,kiuj lerte zorgis pri la " materiaj " detaloj de l'kunveno , regalis nin per speciala aperitivo (ili promesis la recepton)

15.05 = Tri membroj de la Grupo ĉe-estis, en Trouville , la Kongreson de la Federacio Normanda de U F E . Sendube, vi legos aliloke la " teknikan " detalan raporton, sed sciu ke la adiaŭo al S-ino J.Vincent , kiu dediĉis tiom da energio por Esperanto en Normandio , estis tre kortuŝa , kaj la Ĝenerala Kunveno finiĝis en kunkantado de " La Espero " . Bonega tagmanĝo ariĝis poste dudek ŝatantojn de Normandaj frandaĵoj .... dankon Ges-oj Tailpied !

19 ĝis 22.05 = S-ro Chalm kun siaj gelernantoj ekskursis al Greziliono,kie rido,danco,festo,kaj ĉasado kontraŭ krokodiloj konsistigis memorigajn punktojn por tiuj kelkaj tagoj en Esperantujo...

Grava informo : Bone notu la numeron de nia Poŝta ĉekkonto :
" Groupe Esperantiste du Havre " 1 254 85 A Rouen
Ne forgesu ĝin se la sorto favoras vin ĉe Nacia Loterio , ĉevalkurejo , aŭ Lotoludo !

VIZITO de la SOTANOJ 7a kaj 8a de MAJO

La tiom atendata evento okazis !
Fine, 12 membroj de la nia ĝemela grupo surteriĝis je la konvena horo, post marvojaĝo kontentiga. La feliĉaj gastigantoj ricevis siajn gastojn kaj , laŭ la delonge preparita programo , ĉio disvolviĝis por la plezuro de ĉiuj .
Granda nombro de Havranoj ĉe estis la akcepto de la urbestraro.
Ankaŭ multaj sin retrovis en la Junuldomo por la tagmanĝo .
Posttagmeze,ĉiu provis alpropriĝi al si unu anglan Samideanon .
La tuta anaro retroviĝis vespere kaj oni povis kalkuli pli ol 60 kunmanĝantojn , plus vizitantojn .... Babilado fervore regis , dum piano-melodioj pli intime igis la etoson komforta ...
La distra parto komenciĝis per laĉiam ŝatataj elmontroj de la magiisto Ludovik . La Havranoj prezentis viglan skeĉon . Denove , aperis Ludovik,kiu en arto de ventroparolado,distris nin per skeĉo kun sia "filo" Luizo...La vesperaĵon konkludis grupo de gekantistoj de Southampton instruante kanzononfaritan de ili,kiun ĉiuj rekantis.
Dum la dimanĉa tago ĉiu gastiganto distris,veturigis,gustumigis sian gaston , zorgante ke ĉiu Sotano kunportu kiel eble plej bonan memoraĵon pri la ĝemelaj urbo kaj grupo .
La posttagmezan tempon, malgraŭ ne tre favora vetero , permesis viziton aŭtomobilan de la urbo ,inkluzive ekvidon de la arbaro Montgeon : oftaj haltoj permesis klarigadon pri la viditaj lokoj ...
Ĉe la adiaŭa aperitivo ,grupiĝis ankoraŭ 40 personoj , kaj la diritaj vortoj ne estis " adiaŭ " sed " ĝis revido " kiu realiĝos certe tre baldaŭ por pluraj membroj de ambaŭaj kluboj ....

Komitato de Havra Esperantista Grupo

# GAZETELTRANĈAĴOJ

## Les espérantistes de Southampton en week-end au Havre

Dans le cadre du jumelage entre les villes du Havre et de Southampton, douze espérantistes anglais ont séjourné dans notre ville au cours du dernier week-end.

Ils ont été accueillis par le Groupe Espérantiste du Havre que préside M. Jean Gibaux et dont le président d'honneur de l'Union des Espérantistes de Normandie n'est autre que M. Maurice Huet, chef du service des élections à la Mairie du Havre.

La délégation britannique a été reçue samedi midi dans les salons de l'Hôtel de Ville par M. Pierre Bisch, adjoint au député-maire, chargé des sports et responsable du Comité de Jumelage.

Le représentant de la Municipalité n'a pas manqué de dire la joie qu'il éprouvait en recevant le Groupe Espérantiste de Southampton, ville que tant de liens attachent désormais à la Porte Océane. M. Bisch a souhaité à nos visiteurs un heureux séjour dans notre cité, puis le délégué du groupe espérantiste de Southampton a donné lecture d'un message adressé par le maire de la Ville de Southampton à la Municipalité havraise.

Le groupe d'outre-Manche a été ensuite reçu à la Maison des Jeunes et de la Culture de la Porte Océane, par M. Jean Gibaux, Mme Pellier, vice-présidente ; Mme Turmel, secrétaire, et par Mme Langlois, trésorière.

A l'issue du repas pris en commun à la M.J.C. les deux groupes ont donné un spectacle de variétés fort applaudi.

EL LA ĴURNALO "LE HAVRE"

**NATIONS UNIES**

Le bureau d'informations publiques de l'O.N.U. à New York vient de publier la 5e édition de la traduction en espéranto de la Déclaration Universelle des Droits de l'Homme.

Plus de 120 conférences, réunions et congrès internationaux — où la seule langue de travail sera l'espéranto — sont annoncés dans le monde en 1977.

EL: "ESPERANTO ACTUALITÉS" N° 14 (FEBRUARO 1977)

**FRANCE**

217 députés se sont déjà montrés favorables à la proposition de loi n° 1607, concernant l'introduction de l'enseignement de l'espéranto comme matière à option dans les écoles secondaires françaises.

Trois classes primaires françaises participent à une expérience pédagogique internationale et apprennent l'espéranto à raison de deux heures par semaine.

Le Théâtre Espéranto de Paris a reçu le prix de la mise en scène au concours annuel organisé à Versailles par Mme Marcelle Tassencourt, direction du théâtre Montansier et par M. Thierry Maulnier de l'Académie française. Devenu depuis le TESPA, cette troupe dynamique entend diffuser les grandes œuvres théâtrales écrites ou traduites en espéranto lors des congrès internationaux et même auprès d'un public non-espérantiste.

On annonce l'ouverture prochaine d'un musée national de l'Espéranto à Gray (Haute-Saône) qui rassemblera documents et souvenirs, et présentera aux visiteurs l'intérêt et la valeur de la langue internationale.

EL: "ESPERANTO-ACTUALITÉS" N° 14 (FEBRUARO 1977)

## Chronique Espérantiste

Des cours d'espéranto ont recommencé à Caen (Centre socio culturel) et à Vire. A Paris, au Centre Beaubourg l'espéranto figure parmi les langues enseignées par le laboratoire. Plusieurs stations de radio universitaires britanniques diffusent un cours d'espéranto destiné aux étudiants.

De nombreux manuels d'espéranto ont été édités récemment. Ils concernent particulièrement les chinois, les indiens, les tchèques, les iraniens. Par ailleurs d'importants mouvements espérantistes ont lieu en Bolivie, Colombie, Corée du Sud. Il faut noter tout particulièrement le remarquable travail espérantiste accompli en Inde depuis quinze ans par une compatriote, Mme Madeleine de Rodier.

Depuis quelques mois Radio Vatican émet en espéranto sur ondes courtes, également sur cent quatre vingt-seize mètres. L'émission a lieu chaque dimanche de 22 h 05 à 22 h 15. Elle peut être captée assez facilement.

Le Congrès Espérantiste Normand s'est tenu avec succès à Ouilly-le-Vicomte, près de Lisieux les 23 et 24 avril. Les jeunes Espérantistes du monde entier se réuniront en Congrès à Poitiers du 9 au 16 août. Le Congrès Universel d'Espéranto aura lieu à Reykjavik, capitale de l'Islande du 30 juillet au 6 août. [illegible]

Le 61ème Congrès Britannique d'Espéranto s'est tenu à Hastings du 5 au 11 avril.

Une proposition de loi relative à l'introduction de l'espéranto dans l'enseignement secondaire français comme matière à option a été favorablement accueillie par deux cent dix sept députés.

Un musée national de l'espéranto sera ouvert prochainement à Gray (Haute-Saône), un très important musée de l'espéranto se trouve à Vienne (Autriche). [illegible]

Pour tous renseignements sur l'espéranto s'adresser à [illegible] 14 rue des [illegible] à Vire ou à l'Union Française pour l'espéranto 4 bis rue de la Cerisaie Paris 4ème

EL: "LA VOIX DU BOCAGE" 7-6-1977

## POURQUOI SAT-AMIKARO ?

Sous le titre SAT-AMIKARO, l Union ~~française~~ des travailleurs espérantistes des pays de langue française , 67, avenue Gambetta, 75020 PARIS (tél : 797 8705 ) a pour but :

I°) d'enseigner l'Espéranto dans les pays francophones.

2°) de recruter des membres pour SAT ( Sennacieca Asocio Tutmonda ) Association Anationaliste Mondiale,dont l'objectif est l'utilisation pratique de l'Espéranto, instrument intellectuel et moral de culture et d'émancipation pour les travailleurs .

Il existe actuellement dans le monde 7 LEAoj ( Laborista Esperanta Asocio) comparables à SAT-AMIKARO. Ce sont :

SATEB (SAT en Britio) pour les pays de langue anglaise.

DLEA ( Dana Laborista Esperanto Asocio ) pour le Danemark.

SLEA (Sveda Laborista Esperanto Asocio ) pour la Suède .

LEA ( Libera Esperanto Asocio ) pour les pays de langue allemande.

FLE (Asocio de Laboristaj Esperantistoj ) pour les pays de langue néerlandaise.)

JEL (Jugoslavia Laborista Esperanto-Asocio ) pour la Jugoslavie.

SAT-AMIKARO ( Les Amis de SAT) pour les pays de langue française.

Ces organismes sont groupés dans un comité international (LEA komitato ). Ils sont liés à SAT par la convention dite de Gotenburg, discutée et acceptée à l'occasion du 8e congrès de SAT à Gotenburg en I928.

SAT-AMIKARO, dans le cadre de cette convention assure la propagation et l' enseignement de l'Espéranto dans les pays de langue française. Un comité de 9 membres, choisi par le congrès annuel de l'association et ratifié par referendum est chargé de son fonctionnement.

La propagation et l'enseignement de l'Espéranto ne peut en effet être du domaine de SAT. SAT ne peut en aucun cas prétendre éditer, propager, enseigner dans toutes les langues nationales. Son rôle est purement " pere esperanta "Les LEAoj, telle SAT-AMIKARO, sont plus particulièrement outillées pour mener une action spécifiquement "pore esperanta". Ainsi, dans les pays d'expression française, SAT-AMIKARO, son comité et ses responsables spécialisés travaillent à la diffusion de la langue internationale, notamment dans les milieux progressistes : Syndicats et partis politiques ouvriers , mouvements humanistes, écologiques, pacifistes, coopérateurs, mondialistes,culturels, socialistes, libertaires etc..

SAT-AMIKARO publie une revue mensuelle dont la présentation et le contenu sont particulièrement soignés. De nombreux livres d'études et dictionnaires sont édités par notre association:-Nouveau Cours Rationnel, Junul-Kurso, Dictionnaire Pratique, Grand Dictionnaire Espéranto-Français ainsi que des disques et des bandes magnétiques.-

Des ouvrages sur l'Espéranto sont édités par nous en français, tel que :

"Une Humanité, une langue," "ABC d'Espéranto," "Espéranto or English," "Du rêve à la réalité," "Espéranto en 24 pages" etc...ainsi que du matériel de propagande ; prospectus, affiches, papier à lettre, insignes, cartes postales, vignettes etc.

Le service de librairie (Libro-Servo ) de SAT-AMIKARO est unique tant par la quantité des ouvrages disponibles que par la qualité du service. Catalogue sur demande gratuit : Libro-Servo, Bernard SCHNEIDER , 38,ave de la République, 94 320 THAIS.

Des cours d'Espéranto sont organisés dans toute la France, en Belgique et en Suisse par nos groupes ou par nos membres.

Deux excellents cours par correspondance fonctionnent toute l'année :

Un cours élémentaire, premier degré par Clément MARTIN, La Violais, 35310 MORDELLES. Tarif : 60Fr.livre compris.

Un cours deuxième degré par Roland LEVREAUD, 18, rue Couraud, 33240, St ANDRÉ de CUBZAC. Tarif normal 20 Fr. Pour les jeunes jusqu'à 20 ans : 10 Fr.

De nombreux services sont à la disposition de nos sympatisants, de nos membres et des groupes, notamment :

Un service culturel, un service pédagogique, un service de relations publiques, deux expositions itinérantes, deux bibliothèques etc..

SAT-AMIKARO avec UFE ont fondé FEI ( Institut Français d'Espéranto ). A ce titre, notre association participe à l'organisation des examens, aux sessions et à remise des diplômes d'Espéranto.

Les activités proespérantistes de SAT-AMIKARO, dans les pays de langue française, sont effectivement nombreuses. Si elles s'exercent généralement dans les milieux laïques et progressistes, ce qui fait que SAT-AMIKARO n'est pas neutre , elle est par contre absolument indépendante et ne perçoit pas de subventions. Tous les travaux, au sein de l'association, sont réalisés à titre absolument bénévole. Aucun droit d'auteur n'est versé aux membres rédacteurs d'ouvrages édités par nos soins . Nos adhérents participent individuellement et à part entière à la vie du mouvement, tant au cours des discussions et votes de congrès que par le référendum annuel.

SAT-AMIKARO se veut, en conséquence une organisation libre et démocratique.

On peut adhérer à SAT-AMIKARO ou s'abonner à sa revue mensuelle : En France, 40 Fr -(cotisation de soutien : 80 Fr) à verser à notre trésorier, André SADIER, 22 avenue P.V. Couturier, Bt ND, 93 000 BOBIGNY. CCP PARIS 765805 C .

---

**MADAGASCAR**

Une circulaire du directeur de l'éducation secondaire auprès du ministère de l'Education Nationale de la République Démocratique Malgache a permis la création de cours expérimentaux facultatifs d'espéranto, dans toutes les écoles publiques et privées du second degré.

EL "ESPERANTO-ACTUALITÉS"

FEBRUARO 1977

# R A D I E S T E Z O

Estas malfacile precize situi la originojn de radiestezo. Ni simple menciu ke ĝi estis konata de la Egiptoj tiel intime kiel astronomio kaj geometrio ....

Ĉia materio , viva aŭ senviva , dissendas ondojn : radiestezo estas la arto -aŭ la scienco- percepti ilin . Ĝi grupigas la aron de procedoj celantaj al kaptado de tiuj ondoj .

La radiesteza fenomeno difiniĝas tiel :

Ĉe unu flanko, la dissendanto : estas la radiado de la materio per korpuskaj radioj aŭ elektromagnetaj ondoj .

Ĉe alia flanko, la ricevanto : estas la organo de la sesa sentumo .

Ekstera ĉe homo, ĉe kiu la nervo-ekstremaĵoj fariĝas riceva anteno ; se oni, dank'al fadeno de pendolo,aŭ rabdo (vergeto uzata tiucele ) plilongigas la ekstremaĵojn de unu el niaj manoj , la movoj de tiu mano ,kvankam ne ĉiam videblaj,fariĝos tamen sufiĉe gravaj por determini ĉu balancadon , ĉu ĝiradon de la ilo .

Tiu detekto valoras por ĉiuspeca traserĉo : medicino , kombino de mineralaj korpoj , perditaj objektoj , sekso de naskiĝontoj ,persono vivanta aŭ mortinta, studo de karaktero, studo de grundoj, ktp .

Regula trejnado en serĉado de radiadoj pliigas la sentokapablon kaj riceveblecon .

Rabdo estas ĝenerale uzata por elserĉado super gravaj areoj ( tereno , vasta ejo , )

Pendolon oni uzas por serĉo tra limigita spaco .

Du metodoj estas uzataj : La Fizika Metodo, kaj la Mensa Metodo.

Fizika ,aŭ scienca,aŭ racia metodo : ĝi ekskluzivigas metapsikian vizion , intuicion . Ĝi postulas nenian specialan naturdoton . Ĝi apogas sinsur kontrolitaj faktoj ,kaj laboras sur objektivaj postulatoj .Ĝi referiĝas je specifaj reguloj , serioj , ondolongoj .

La fizika metodo ,pasiva sintezo, ne necesigas komplikan inicadon ; ĝi proponas nur simplajn kaj raciajn procedojn kiuj igas ĝin tuj ebla por la plej parto de la serĉantoj .

Kontraŭe , la Mensa metodo ,selektiva sintezo,respondas kelkfoje pli bone je la speciala sentemo ,aŭ propra povo de iuj serĉantoj . La " mensistoj " ne zorgas pri ia ajn regulo , kaj psike eniĝas en la esplorotan terenon ... La plej konvena difino de la mensa radiestezo estas ĉi-tiu : perceptado, per la nervo-sistemo kaj la sub-konscio,de la radiadoj de la estuloj kaj aĵoj .

En tiu alvoko al lasubkonscio,du fakultoj nepre intervenu :

1) Atento : sin koncentrante , evitante ĉian emocion .

2) Volo : esti penetrata de la intenco ricevi klarigojn pri tiu aŭ tiu ĉi demando .

La necesa ilaro por la mensa radiestezo reduktiĝas je la minimumo : pendolo , pintaĵo-anteno aŭ nigra krajono zorge pintigita .

La fizika metodo krome bezonas : kompason por situi la magnetan nordon , magneton por malsaturi la laborojn , duoblan decimetron por mezuri la ondolongojn , nigran paperon por izoli la laboraĵojn .

Jen la esenco por eksperimenti la radiestezan sentumon ...

Estas tro simple diri " Mi kredas je tio ... aŭ , mi ne kredas "

Prefere , konu ĝin per eksperimentado !

( El parolado de S-ino …oltier en Le Havre )

---

ne forgesu vian jaran kotizon al U.N.E.
7,00 fr. minimume. Dankon !
c.c.p. : Rouen 293 40 H